


Informilo de Septembro 2018

Numero 36, septembro 2018

Kuriero de UNESKO : Unujara, 12 junio 2018




Ĝis 2012 la Kuriero de UNESKO, ĉefa organo de tiu internacia organizaĵo, estis eldonita en 36 lingvoj, sed en tiu jaro la papera eldono ĉesis pro financaj problemoj. En 2017 ĝi reviviĝis ĉar la Ministerio pri Edukado de Ĉinio transprenis la produktokostojn en la ses oficialaj lingvoj (angla, araba, ĉina, franca, hispana, rusa), kaj aldoniĝis versioj, diversmaniere financataj, en tri pliaj lingvoj, interalie Esperanto. Por bilanci la laboron, fermita kunsido estis organizita ĉe UNESKO en Parizo matene la 12an de junio, al kiu estis invititaj la diverslingvaj redakcioj.

Kiel diris enkonduke al la kunsido Vincent Defourny, Direktoro de Publika Informado kaj Direktoro de la Kuriero, la esperantistoj tuj kaptis la pilkon! Por la Esperanto-versio, venis la ĉefredaktoro Trezoro Hyang Yinbao el Ĉinio kaj ĉeestis ankaŭ Renée Triolle, reprezentanto de UEA ĉe UNESKO. Ambaŭ pozitive intervenis. Inter la traktataj demandoj: Kiel samtempe konservi la altan nivelon de artikoloj, garantii kulturen diversecon per alvoko al diverslandaj kontribuantoj, teni pensigan redaktlinion kaj grandigi la nombron de legantoj?

Posttagmeze, en ĉeesto de la Ĝenerala Direktorino, Audrey Azoulay, la invititoj kune diskutis pri la temo "Konstrui komunan estonton por la homaro tra dialogo kaj kunlaboro". La tago finiĝis per brila spektaklo pri "Tradiciaj artoj, nemateria kultura heredaĵo de Ĉinio".

La 103-a Universala Kongreso de Esperanto kunvenis en Lisbono.

Teatraj kaj muzikaj prezentoj, fakaj prelegoj, akceptoj, bankedoj, aferkunsidoj, kaj amaso da aliaj aranĝoj formalaj kaj neformalaj markis la 103-a Universalan Kongreson de Esperanto, kunveninte en Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018, kun pli ol 1500 partoprenintoj el 73 landoj,



"Kultura heredaĵo, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?" estis la temo de la kongreso, traktita en kvar plensesioj en la daŭro de la semajno. La fina kongresa rezolucio notis "la koincidon de ĉi tiuj diskutoj kun la 100-a datreveno de la fino de la Unua Mondmilito, kiu markis turnopunkton en la tutmondiĝa procezo" – kaj fakte pluraj kongresaj kunsidoj donis apartan atenton al tiu okazintaĵo.

"Kultura kaj lingva diskriminacio", parte ligita al la heredaĵo de koloniismo ricevis apartan emfazon en la rezolucio, kiu atentigis, ke "la neŭtrale homa lingvo Esperanto estas potenca rimedo por mensa malkoloniado, ebliganta reciprokan interkonatiĝon kaj kompreniĝon ekster la kutimaj kadroj de privilegio kaj ekskludado."

La rezolucio alvokis al "urĝa atento al la defiaj problemoj de lingva, kultura kaj alispeca diskriminacio" kaj deklaris "la pretecon de la parolantoj de Esperanto kunlabori en agadoj por helpi kaj protekti homojn kaj popolojn kontraŭ tia perfortado." Ĝi apelaciis al ĉiuj Esperanto-aktivuloj sin dediĉi "al praktika solidareca agado kun la suferantoj" kaj aparte aludis al migrantoj kaj rifuĝintoj kiel aparte afliktitaj de lingvaj malfacilaĵoj.

La Ĝenerala Direktorino de UNESKO Audrey Azoulay mesaĝis al la 103-a Universala Kongreso de Esperanto

La Ĝenerala Direktorino de UNESKO Audrey Azoulay estis inter tiuj kiuj sendis specialajn salutojn al la 103-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu lastatempe kunvenis en Lisbono. Jen la teksto de ŝia mesaĝo:

Mi estas feliĉa povi sendi ĉi tiujn subtenajn vortojn al la partoprenantoj de la 103-a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio.

Vi havas la bonŝancon kunveni en tiu belega urbo Lisbono, urbo ligita al vasta historio, kiu konstruiĝis en vojkruciĝo inter diversaj kulturoj, urbo malfermita al la mondo, tutokcidente en la Iberia duoninsulo. Mi ne dubas, ke tiu elstara kadro sukcesos inspiri al vi fruktodonajn interŝanĝojn.

Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj. Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.

La cemento de ĉiuj tiuj valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, interkomunikiĝi.

La lingvoj, kiuj estas la vektoro ebliganta tiun dialogon, konsistigas do la esencan ilon por atingi la celojn, kiujn ni devas realigi, kaj same por la defendo de niaj valoroj.

Ni devas defendi la lingvojn, ĉefe la maloftajn lingvojn, la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias, ke ili malaperas nuntempe laŭ la ritmo de po unu ĉiujn du semajnojn – kio estas neriparebla perdo por la homa heredaĵo.

Ni devas defendi ankaŭ la plurlingvismon en la instruado, per adekvataj publikaj politikoj, sed ankaŭ en la virtuala spaco de la interreto, por ke plu vivu la lingva kaj kultura diverseco de ĉiuj homgrupoj; por ke ĉiu povu lerni pri sia historio, sia identeco, ĉerpante el la simbolaj fontoj de sia origina etno.

Tiu sin-engaĝo estas ankaŭ la via. Ĉar Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo; male, ĝi reprezentas taŭgan ilon por komuniki en respekto de ĉiuj lingvoj, ĉu minoritataj, ĉu de la plimulto, kaj realigas la ekziston de homgrupo de parolantoj, sendependaj de iu ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio.

Paroli Esperanton estas sin levi al kosmopolitika konscivnivo, esti mondĉivitano – sen forlasi siajn apartajn ligojn. La temo elektita por via kongreso en tiu ĉi jaro estas: “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?”

La elektenda direkto certe estas tiu, kiun via Movado kaj nia Organizo montras de multaj jaroj: engaĝiĝi pli kaj pli por savi kaj vivteni tiun esencan parton de la nemateria homara heredaĵo: la lingvojn; defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi al plurlingva edukado. Tiel ni sukcesos konstrui mondon pli malfermitan, pli inkluzivan kaj pacan.

“Multaj voĉoj, unu mondo” – jen la slogano de nia fame konata organo Unesko-Kuriero.


“Multaj voĉoj, unu mondo”, tiel tradukiĝas al Esperanto tiu idealo, kiun vi kaj ni havas – kaj kiu estas skribita sur la versio de nia revuo, aperanta ekde nelonge en Esperanto.

Fine mi volas esprimi, nome de Unesko, elkorajn bondezirojn por la sukceso de via Kongreso.

Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktorino de Unesko

La Esperanto-movado festas la Internacian Tagon de la Paco

Okaze de la Internacia Tago de la Paco, Universala Esperanto-Asocio dissendis la jenan mesaĝon, direktitan kaj al la Esperanto-movado kaj al internaciaj organizaĵoj laborantaj por la paco:



La 21-a de septembro estas la Internacia Tago de la Paco, festata tra la mondo sub aŭspicio de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu ĉi tago estas okazo por memori la gravecon de paco, la fruktojn de paca vivo, kaj la fakton, ke multaj homoj tra la mondo vivas en stato malpaca, en kiu ilia bonfarto, ilia libereco, kaj eĉ la propraj vivoj, estas konstante minacataj kaj kompromitataj.

La Ĝenerala Sekretario de UN, António Guterres, anoncis, ke ĉi-jare oni aparte memoros la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, akceptitan antaŭ sepdek jaroj kiel fundamenton de la postmilita monda ordo. Ĝia tria Artikolo asertas, ke “Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco,” sed tro ofte oni forgesas pri tiuj rajtoj – kaj forgesas, ke antaŭ sepdek jaroj la internacia komunumo solene deklaris sian fidelecon al tiuj principoj.

Universala Esperanto-Asocio povas fiere noti, ke ĝia statuto klare aludas, en sia kvina Artikolo, al la Deklaracio, notante, ke “Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.”

Per sia laboro por rekta komunikado inter la diversaj popoloj kaj por la digno de ĉiuj homoj tra la mondo en egaleco kaj en lingva justeco, Universala Esperanto-Asocio ree sin dediĉas al la idealoj esprimataj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĝi rekonas la strebojn de Unuiĝintaj Nacioj, ofte en plej malfacilaj cirkonstancoj, agadi por la paco kaj repacigi malamikojn, kaj ĝi denove promesas daŭrigi sian laboron, subtene al UN kaj aliaj similcelaj civilsociaj organizaĵoj strebantaj al kreo de pli paca kaj pli egaleca mondo.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

[1] 212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041